

Kulturaj Kajeroj

E.MAME

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 50 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

JULIO - AŬGUSTO - SEPTEMBRO
OKTOBRO

1982 - 4 - 5

KULTURAJ KAJEROJ

1982 JULIO-AŬGUSTO-SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon
Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Malkovro de la regiono ĉirkaŭ Grésillon.
Pri la ekskurso al la urbo « Angers » — F. Boyet

La ĉiutaga pano — E. Babin

La enigma malapero de la mamutoj, antaŭ 10 000 jaroj — S. Guillot

La sekreto de Mastro Cornille — A. Daudet trad. A. Ribot

Solecaj provincanguloj de Esperantujo — A. Boccalatte

Grésillon 1982 — B. George

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

La 30-a datreveno de la fondo de la Esperanto-Domo estis festita intime en la familia rondo grezijona. Dum ĉiu el la kvar periodoj unu tago estis dediĉita al tiu festo : rakonto al la ĉeestantoj de la historio de la Domo ek de la malfacilaj pioniraj jaroj kaj festeneto, ĉar ni ne forgesu, ke ni estas en Francujo. Neniu grandioza solenaĵo. La ĉeesto de oficialuloj, eĉ starantaj sur alta regiona ŝtupo, povas alporti plezuron eĉ iluziiĝon al kelkaj, sed ne multon al Esperanto. Esperanto devas pruvi sian efikon koncerne interhoman kompreniĝon, ne provi trudi sian veron.

Kion alportis tiu datreveno al la grezijonaj responduloj ? La okazon pense reveni al la antaŭaj jaroj, rigardi la evoluon ne nur materialan. Ĉu Gresillon ne fariĝis por kelkaj pli feriejo ol studcentro. Ĉu tiu evoluo estas entute bedaŭrinda ? La statutoj de la Asocio antaŭvidas ankaŭ la distradon de la ĉeestantoj ; la celo de la fondintoj estis helpi la esperantistojn kaj servi Esperanton. Oni servas Esperanton ne nur instruante ĝin, kio estas gravega unua paŝo, sed ankaŭ praktigigante ĝin. Ĉu tio eblas nur en kurso ? Ĉu viva lingvo povus funkcii nur inter la muroj de klasĉambro ? Ĉu ĝia utilo-kampo estus nur la esperantista medio ? Ĉu oni trovu en Gresillon nur kion oni povas trovi en iu Esp.-renkontiĝo aŭ kongreso ? Unu el niaj celoj estas la plivastigo de la eblecoj de uzado de la lingvo. Pro tio la eksterkursaj aktivaĵoj gravas. Ili ne estas « kromaĵoj ». Ili devas esti esenca parto de la praktikado. En kurso ne estas facile krei ĉiujn naturajn, spontanajn cirkonstancojn de uzado de la lingvo. La kurso alportas la materialon kaj la refleksojn. Sed ĉar esperanto ne estas nur kursa lingvo oni devas uzi tiun materialon kaj nature, spontane funkciigi la refleksojn en ĉiuj cirkonstancoj eksterkursaj. La artmetiaj aktivaĵoj, kiujn ni organizas, laŭ niaj ebloj, dum ĉiu periodo ne estas nur distraĵoj : ili devas esti plia okazo praktiki la lingvon. La eksperimentado de periodo precipe dediĉita al inicado kaj praktikado de artmetioj pruviĝis iom post iom grava. Nur manko de sufiĉe da gvidantoj malhelpis la ampleksigon de la varieco de la proponataj aktivaĵoj. Ek de 1983 ni esperas, ke tiuj aktivaĵoj estos pli multaj.

Ege utilaj estas tiuj eksterkursaj aktivaĵoj ankaŭ por montri al la krokodilemuloj diverslingvaj, ke oni devas paroli esperanton ankaŭ ekster la klasĉambroj.



Esperanto tra la Mondo

Sukceso de la universala kongreso en Antverpeno :

Inter la 24a kaj la 31a de Julio, la partopreno de 1899 gekongresanoj el 50 landoj kaj bona organizado neprigis la sukceson de la 67a universala kongreso de Esperanto, en Antverpeno (la 3a kiu estis organizita en tiu urbego depost apero de nia lingvo).

La elstara punkto de la inaŭgura kunveno estis la parolado franclingva de la invitito : S-ro Mustapha Masmoudi, ambasadoro de Tunizio ĉe UNESKO, kaj prezidanto de la konsilio pri informado de la Nealiancitaj Landoj.

Okazis la kutimaj eroj : kunveno pri la ĝenerala temo « generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado », muzika, teatraj, varieteaj, pupteatraj spektakloj, tago de la lernejo, fakaj kunvenoj, kongresa universitato, infana kongreseto, ekskursoj, kunsido de la Akademio, belartaj konkursoj, ktp...

Rezolucioj estis akceptitaj (pri Jaro de la komunikado, Jaro de la Junularo, turismo, pri Monda Asembleo de Maljuniĝo).

Dum la sekvanta semajno, okazis la Junulara Kongreso de TEJO, en Leuven, ankaŭ en Belgio. Temo : « Scienco kaj socio ». Ĉeestis 348 gejunuloj.

Samperiode, ankaŭ disvolviĝis la 50a internacia kongreso de blindaj esperantistoj (IKBE), en Breda, Nederlando, kun 120 partoprenantoj el 18 landoj.

Oni tie anoncis la baldaŭan surbendigon de la revuo « Esperanto », voĉlegitajn numerojn de « Heroldo » kaj « Monato », la preparadon de brajla eldono de « Plena analiza gramatiko » (12 dikaj volumoj).

S.A.T. kongresis en Iisalmi :

La 55a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazis de la 31a de Julio, ĝis la 6a de Aŭgusto en Iisalmi, Finnlando. 237 esperantistoj el 15 landoj ĉeestis la kongreson kaj ĝiajn kutimajn erojn.

La kongreso aprobis deklaracion kies konkludo estas : « Nur Esperanto povas esti solvo al la problemoj de monda komunikado, de analfabeteco de etnaj malplimultoj, kaj lingva ponto inter ĉiuj popoloj kaj kulturoj ». La 56a kongreso de S.A.T. okazos en Linz, apud Danubo.

Vi jam povas noti por 1983...

— La universala kongreso 1983 okazos en Budapeŝto, de la 30a de Julio, ĝis la 6a de Aŭgusto. Temo : « Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado ».

Krome, oni jam scias ke la universalaj kongresoj okazos estonte en la jenaj urboj : 1984, Vancouver (Kanado) ; 1985, Augsburg (Germanio) ; kaj eble en Pekino por 1986 !

— La internacia fervojista kongreso 1983 okazos en Belgio kaj kongreso 84 en Bulgario.

— Internacia konferenco de la edukistoj (ILEI), en Sintra, (Portugalio), de la 14a ĝis la 22a de Julio 1983.

— Esperantotagoj dum la printempa foiro de Leipzig (D.D.R.), de la 11a ĝis la 13a de Marto.

— Internaciaj sksemajnoj, aranĝitaj de la fervojistoj, de la 22a ĝis la 29a de Januaro en Germanio, kaj de la 12a ĝis la 19a de Februaro, de la 19a ĝis la 26a de Februaro en Aŭstrio.

— Por la fino de 1982, okazos la jam tradiciaj renkontoj por junuloj, kaj samtempe por junaj familioj, en Germanio. Tiujare, de la 27a de Decembro 82 ĝis la 3a de Januaro 83 en Oberwesel. Informas Ursula Felhölter, Töpferstr. 20, D-4500 Osnabrück.

— Aliaj jarfinaj renkontoj en Budapeŝto. Informas H.E.A., Pf 153, H-1443 Budapeŝto, Hungario, kaj en Torun (Pollando).

Novaj eldonaĵoj :

— « La bestofarmo » de George Orwell, tradukita de Gerald Tucker.

— « Boule de suif » de Guy de Maupassant. Traduko de Fernando de Diego.

— « Hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ », noveloj originalaj de Bernard Golden.

— « Nudpieda Gen », bildrakonto pri japanaj atombombitoj. Ne nur infana literaturo, sed porpaca verko.

— « Elektitaj satiroj », de la izraela humoristo Efraim Kišon, traduko de Gerhard Ziegler.

— « Misio sen alveno », sciencfikcia romano de J. Francis.

— Repreno de « Ifigenio en Taŭridо » de Goethe, en la traduko de Zamenhof.

— « Sciencaj prelegoj de la 3a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco ».

— « Kiu estas kiu en scienco kaj tekniko 1981 » (225 sciencistoj kaj teknikistoj kiuj uzas Esperanton).

— Dua disko en Esperanto de Max Roy Carrouges (33t/m) : « Esperanto kaj libereco ». Distribuas CBS, produktis Arion ; Ref. ARN 34666.

Koordinataj agadoj por disvastigo de Esperanto en la tria mondo :

La revuo « Esperanto » de UEA (numero de Julio-Aŭgusto) dediĉis interesajn kaj legindajn artikolojn al la farotaj agadoj por helpi la disvastigon de la internacia lingvo en la tria mondo.

Por Afriko, S-ro Hans Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nedrelando, funkcias kvazaŭ kiel « reprezentanto » de UEA.

Por Azio, estas S-ino K. Kikusima, fakdelegitino de UEA en Tokio.

La agado en kadro de ĝemeliĝoj de urboj aŭ grupoj estas speciale rekomendinda.

Por Ĉinio, Ĉina Esperanto-Ligo volonte helpas iniciati kunlaboron sur la loka nivelo.

Prisciencaj manuskriptoj serĉataj :

Scienca Eldona Centro de UEA, en Budapeŝto, serĉas, por eldono, manuskriptojn pri sciencaj kaj sciencpopularigaj temoj, ĉu originalajn ĉu tradukitajn.

Sendu proponojn kun ĉiuflankaj detaloj, al SEC, Pf 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.

Malkovro de la regiono ĉirkaŭ Grésillon
Pri la ekskurso al la urbo : " Angers "

Antaŭa klarigo : En la franca lingvo la vorto « angevin » montras kaj la loĝanton de la urbo : « Angers », kaj la loĝanton de la provinco : « Anjou ». Por pliklarigi la prezentaĵon, kaj por ne trudi « fremdajn vortojn » en la esperantlingvan tekston, mi nomos la urbon : Anĝevo, kaj la loĝantoj estas anĝevanoj, kaj la provinco estos Anĵuo, kies loĝantoj estas anĵuanoj.

Tra historio de Anĝevo.

Tre verŝajne, la roka elstaraĵo superanta la riverbordon, kiu uzeblas kiel observejo same kiel defendejo, estis loĝata de antaŭ longa tempo, kiam la romiaj konkerantoj, post venko kontraŭ la loka militestro « Dumnak », donis la nomon « Juliomagus » al la ĉefurbo de la kelta tribo de Andegavoj. Tiu urbo, grava en la romia imperio, kreskis kaj prosperis, oni konstruis banejojn (kiujn oni ĵus malkovris okaze de fosado cele al subtera aŭtejo) arenojn, cirkojn... Je la kvara jarcento, sub influo de la episkopo de Tours fama sub la nomo de Sankta Marteno, la popolo kristaniĝis, kaj en 423 Sankta « Morij' » estis la unua episkopo en Anĝevo.

Sed venis la tempo de la invadoj, Anĝevo, kiu staras je kruciĝo de vojoj de norde suden kaj de oriente okcidenten, estis multfoje atakita, prirabita, brulgita, kiel multaj aliaj lokoj. Pasis la Frankoj, la Saksoj, la Bretonoj kaj la Vikingoj.

Je la naŭa jarcento, la urbo fariĝis ĉefa centro por la estroj de la Anĵua regiono, kaj sur la roka elstaraĵo estis konstruita fortikaĵo. En tiu tempo, la tuta urbo estis kripliĝinta en malgranda areo apud la fortikaĵo, kaj ĝin defendis propraj remparoj. Tiu malgranda urbo estas nun videbla en la parto de la urbo nomata « civito ».

Sed la dukoj de Anĵuo akiris potencon kaj la urbo profitis de tiu potenco, kiu alportas ankaŭ riĉecon. La apogeo de tiuj potenco kaj riĉeco situas en la mezo de la dek-dua jarcento, kiam la duko de Anĵuo estis reĝo de Anglio. Tiam konstruiĝis pluraj monumentoj, kiuj ankoraŭ ekzistas nun kaj montras specialan formon de arkitekturo, inter romanika kaj gotika kaj nomata anĵua stilo. En Anĝevo naskiĝis en la dek-dua jarcento : la nuna katedralo, la hospitalo « Sankta Johano », kiu nun estas muzeo, la abatejo Sankta Albano, kies restaĵoj estas videblaj en la prefektejo kaj en turo, kiu staras en komerca kvartalo.

La dek-tria jarcento estis la tempo de la konstruo de la nuna kastelo. Tiam la regiono estis parto de Franclando, kaj la reĝo Ludoviko la naŭa dec.dis rekonstruigi la malnovan fortikaĵon. Tiam, inter 1230 kaj 1238, oni konstruis la kastelon, kies restaĵoj estas nun videblaj. En la sama tempo, oni plu konstruis la katedralon, kies navo estis elkonstruita en 1271 kaj suferis konkurencon de la kastelo. (La reĝo rekviziciis la ŝtonojn destinitajn al la preĝejo). En tiu periodo oni fortikigis ne nur la kastelon, sed ankaŭ la tutan urbon per remparoj, kiuj amplekse la du bordojn de la rivero, kaj kiuj situis, kie estas nun bulvardoj. Por kompletigi la fortikaĵon, oni baris la riveron norde kaj sude de la urbo per ĉenegoj, kiujn oni nomis, pro la direkto norde suden de la rivero : la supra ĉeno (norde) kaj la malsupra ĉeno (sude). Tiuj ĉenoj kompreneble malaperis, sed nun ekzistas pontoj, kies nomoj estas : supraĉena ponto kaj malsupraĉena ponto, respektive norde kaj sude de la mezepoka urbo.

Post la militoj kaj epidemioj de la 14-a jarcento, la vivo estis multe pli facila, la regiono denove prosperis, kaj el tiu prospero naskiĝis diversaj artaĵoj ankoraŭ nun videblaj. En la kastelo mem la dukoj konstruigis diversajn kasteletojn kaj kapelon ĉirkaŭ la jaro 1400. Apud la katedralo la « domo de Adamo » datumas de la dek-kvina jarcento. Tiu dek-kvina jarcento estis tiu de la reĝo Renato, kiu favoris la artojn, verkis mem poemojn kaj iniciatis bredadon de bestoj en la fosaĵo de la kastelo, kutimo kun oni renovigis, kiel povas nun konstati la turistoj. (Tiu « reĝo » Renato estis fakte duko de Anĵuo, sed samtempe reĝo de Provenco, kaj suvereno en Loreno).

Post la morto de Renato, la anĵua dukejo transiris al Ludoviko la dek-unua, reĝo de Franclando, kaj de tiam Anĝevo ne plu estis ĉefurbo de suverena duko, sed iu urbo en Franclando. La franca reĝo instalis en Anĝevon iun gravan tribunalon, kaj, ankoraŭ hodiaŭ, tiu tradicio konserviĝis, ĉar Anĝevo estas sidejo de apelacia kortumo. En la dek-sesa jarcento la prospero daŭris, kaj tion montras la domoj tiutempaj, kiuj estas Renesanc-stilaj kaj inter kiuj pluraj estas nun muzeoj.

Sed venis bataloj inter katolikoj kaj protestantoj, tiam iu reĝo decidis detruigi la kastelon, sed la guberniestro sukcesis prokrastigi la plenumon de tiu decido, kaj pro tio malaperis nur la supraj partoj de la turoj. Ankaŭ en la dek-sesa jarcento iu duko de Anĵuo (filo de franclanda reĝo), kiu estis samtempe reĝo de Pollando konstruigis domon, kiu ankoraŭ nun ekzistas sub la nomo : « domo de la reĝo de Pollando » !

Meze de la dek-sepa jarcento, dum la ribelo de la juĝistoj kaj nobeloj kontraŭ la ĉefministro « Mazarin », la urbo Anĝevo partoprenis tiun ribelon kaj la armeo de la reĝo sieĝis la urbon. Post tiu epizodo, la urbo restis trankvila ĝis la franca revolucio, kaj eĉ la kastelo estis provizora malliberejo por la fama ministro « Fouquet » arestita fare de la reĝo Ludoviko la 14-a, kaj pere de la famkonata oficiro « d'Artagnan » popularigita de la romano de Aleksandro Dumas (la tri musketistoj).

Kiam okazis la ribelo de la vendeanoj kontraŭ la respubliko (1793) ĝin partoprenis la anĵuanoj de la suda parto de la provinco, sed la anĝevanoj restis fidelaj al la respubliko. La trupoj de la vendeanoj atakis la urbon, sed estis repelitaj fare de la respublikanoj.

Post la revolucio ĝis nun, Anĝevo vivis pace kun la cetero de Francio kaj mencindas nur la elvolviĝo, en la dudeka jarcento, okaze de la ĝenerala migrado el la kamparo al la urboj pro industriiĝo.

La vidindaĵoj en Anĝevo.

La kerno de la urbo estas la kastelo, fortikaĵo konstruita laŭ la modelo de la kasteloj konstruitaj en Palestino okaze de la krucmilitiroj. La celo ne estis beleco sed firmeco de fortikaĵo. Tamen la turoj estas iom specialaj pro la uzo de blue nigraj ardezaj skistoj alterne kun blankaj ŝtonoj. Tiuj turoj, kiuj estas dek sep, estis unue multe pli altaj, nun nur unu konservis la antaŭan altecon pro la ordono detrui ĉi-supre rakontita. El la du pordoj, nur unu estas nun uzata de la turistoj, kiuj devas transpasi la fosaĵon dank'al lev-ponto. Kiam ili vidas la internon de la kastelo, ili transiras de la dek-tria al la dek-kvina jarcento per la kapelo kaj la loĝejoj de la reĝo kaj tiu de la guberniestro. Ankaŭ en la kastelo estas, en tute moderna konstruaĵo, konservita tapiserio

de la 14-a jarcento, mendita de la tiama duko de Anjuo, teksita de Nikolao Bataj' laŭ pentraĵoj de Henkin de Bruĝo, kiu mem prenis modelon en la ilustraĵoj de la religiaj libroj. La temo estas Apokalipso, origine la tapiserio estis 107 metrojn longa kaj ses metrojn alta, sed pro diversaj difektoj tra la militoj, ĝi nun estas malpli granda. La paneloj montras epizodojn de la rakonto sur fono ruĝa aŭ blua.

Elirante la kastelon, oni povas admiri larĝan panoramon antaŭ ol eniri la « civiton », k.e la stratoj estas tre mallarĝaj, kaj kie multas la malnovaj domoj.

Trans la civito troviĝas la katedralo. Tiu monumento estas tipa de la anĵua stilo kun tute specialaj volboj, sed la konstruado, estis kontraŭigita de tiu de la kastelo, kaj la nunaj turoj datumas nur de la 16-a jarcento, same k.el la portalo, kiu montras Sanktan Maŭricon kaj liajn kunulojn vestitajn laŭ la tiama modo. Ankaŭ la vitraloj estas speciale vidindaj, ĉar iuj datumas de la 12-a jarcento apud aliaj multe pli modernaj ; ili vere estas « muzeo de la vitralo ».

Malantaŭ la katedralo troviĝas la domo de Adamo, burĝa domo konservita de la 15-a jarcento, laŭ mezepoka stilo, kaj se oni disponas pri tempo oni povas trovi multajn restaĵojn en tiu kvartalo : restaĵo de malnova fortikaĵo de la civito, fontano de la 15-a jarcento k.t.p.

Irante al pli moderna parto de la urbo, oni rapide atingas la centran placon nomatan « placo de la kunvenigo », kie situas, krom grandaj magazenoj, administraj domegoj, ankaŭ la urba teatro, kiu datumas de la 19-a jarcento. La stilo de la placo estas tute moderna, kun subtera parkejo por aŭtomobiloj, diversaj ŝtonaj elstaraĵoj kaj granda metala fontano. Okaze de la konstruo de la parkejo, oni malkovris tombejon de la Merovida epoko, kiam tiu loko estis ekstera al la tiama urbo.


Per vojo rezervita al piedirantoj, kun multaj butikoj, aŭ per larĝa bulvardo, kie cirkulas senfinaj vicoj de aŭtomobiloj, oni povas iri al alia parto de la urbo, kie la pejzaĝo estas pli ampleksa. Pluraj placoj apudas, kaj la plej centra estas vasta ĝardeno kun fontano, kiosko por muziko tute laŭ stilo de la 19-a jarcento. Malantaŭ la ĝardeno etendiĝas longa avenuo, ankaŭ malpermes.ta al aŭtomobiloj, kaj dank'al tiu apudeco la perspektivo estas preskaŭ senfina kaj draste kontrastas kun la strikteco de la civito.

Irante laŭ la bulvardo, oni vidas maldekstre la tute novan urbodomon kaj dekstre, malantaŭ granda placo kiu estas parkejo por aŭtomobiloj kaj ankaŭ sabate plenaera bazaro, videblas la juĝejo, granda palaco laŭ la stilo de la 19-a jarcento.

Preteriante la ĝardenon de la plantoj k.e estas nun konstruata granda kongresejo, oni atingas la ponton de la supra ĉeno, kaj sur la alia bordo de la rivero estas la malnova hospitalo Sankta Johano, en la anĵua stilo de la 12-a jarcento. Nun ĝi ne plu estas hospitalo sed muzeo, kie estas konservitaj la modernaj tapiserioj de Johano Lursa (Jean Lurçat), kiu verkis laŭ la temo de moderna apokal.pso : la nuklea armilo. La titolo de la verko estas : « La kanto de l'mondo », ĝi estis verkata inter 1957 kaj 1965 kaj konsistas el dek paneloj, kiuj kovras entute 80 metrojn laŭ la longo kaj 4 metrojn kaj duonon laŭ la alteco. Tiuj paneloj montras kaj la atombombon kaj la konkeron de la spaco, tio estas la plej modernaj temoj ; la fono estas nigra opozicie al brilaj koloroj.

Kiam oni disponas pri pli da tempo, oni povas viziti la muzeojn : la belarta muzeo troviĝas en domo de la 15-a jarcento (loĝejo Baro', laŭ la nomo de la konstruiginto), kaj estas alia muzeo pri antikvaĵoj kaj ekzotaĵoj en alia fama burĝa domo de la 16-a jarcento, la « loĝejo Pince ». La naturamikoj povas promeni en la parko de la kuniklejo kaj ĉirkaŭ la lago de Sankta Nikolao, ĉe la okcidenta limo de Anĝevo.

F. BOYET.



La Ĉiutaga pano

Se ni nur konsideras la banalan difinon de la vortaroj, pano estas : « manĝaĵo farita el knedita, fermentita kaj bakita faruno ». En la realo la pano estas multe pli ol tio ; ĝi fariĝas vivo-simbolo.

En nia epoko, almenaŭ en nia lando Francujo, la pano perdis iom de sia antaŭa prestĝo por la pli multo el la homoj kiuj manĝas multe malpli da ĝi ol antaŭ eĉ 50 jaroj. La diferenco estas granda inter la panbuleto aŭ panstangeto skrapmordita ĉe tablo superŝutita de manĝaĵoj kaj la antikva sesfunta panbulo el kiu oni detranĉis pecegojn, kiuj konsistigis la ĉefan nutraĵon de niaj prapatroj eĉ ofte la nuran nutraĵon. Niaj junaj samtempuloj ne facile imagas la respekton de niaj antaŭtempuloj por tiu Princo de la Nutraĵaro.

Jam antaŭ dekoj da jarcentoj la mediteranea homo sin nutris per pano, laŭ la produktebleco. La plej antikvaj skribaĵoj, el kiuj la Biblio, mencias kion niaj modernaj ekonomikistoj nomas « bazan nutraĵon ».

En la valo de Mambre, en Palestinio, Abrahamo ofertis panon al la anĝeloj alportintaj al li, la Sanktaj Skriboj diras, le diajn dekretojn. En la epoko de Moseo la Egiptoj jam utiligis fermenton por malpezigi kaj plibongustigi sian panon. Pano naskiĝis en « la Fekunda Krescento » kiu etendiĝas de la palestinaj ebenaĵoj ĝis Mezopotamio tra Sirio ; poste ĝi konkeris la mediteraneajn bordojn kaj tutan okcidenton.

Fariĝinte nepre necesa manĝovaro, la hordeo-pano, la tritiko-pano, la sekalo-pano, blanka aŭ nigra, regis la vivon de la okcidentaj homoj, same kiel la rizo en Azio, la sorgo kaj milio en Afriko, la maizo en Ameriko. Ĝi profunde influis la homojn, eĉ iliajn esprim-manieron : « gajni panon per frunta ŝvito », « esti tiel bona kiel pano », « promesi pli da butero ol da pano ». En la malnovaj tempoj la servisto « manĝis la panon de la aliaj », kaj kiam li maljuniĝis li ricevis de siaj mastroj « la panorenton » sub formo de tritiko aŭ faruno. Murdisto « senigis la murditon je la gusto de la pano ». La mallaboremulo « ne valoris la manĝitan panon ». Tiuj, kiuj iom post iom defalis de bona situacio estis « manĝintaj sian blankan panon unua ». Enuiga tago estis « longa kiel senpana tago ». La almozdonemaj personoj « eltiris panon el sia buŝo » favore al la aliaj.

Dum la absoluta monarkio oni diris, ke la malliberulo aŭ galerulo « manĝas la panon de la reĝo ». Junulino needziniĝinta kiu naskis infanon estis « preninta tro frue el la fornpleno ». Tiu, kiu ne distriĝis sed nur rigardis la aliajn plezuriĝantajn « manĝis sekan panon en la odoro de rostaĵo ». Ni ne citos plu, ĉar diraĵoj inspiritaj de la fascina pano povus plenigi paĝojn post paĝoj.

Tiel grandaj estis la nepra neceseco kaj la esencaj efikoj de la pano, ke tre rapide la homoj respektis, preskaŭ kultis ĝin kvazaŭ idolon apud la viviga suno. La homoj, alpreĝante la ĉielajn potenculojn petis certigon de la nutra pano. De pli ol dudek jarcentoj la kristanoj humile daŭre petas la Dion « alporti al ili la ĉiutagan panon ». Kaj ni ne forgesu ke Kristo fondis Eŭkaristion, antaŭ preskaŭ dumil jaroj, en la formoj de pano kaj vino. Tiu pieco por tiu sanktega nutraĵo esprimiĝis dum longa tempo per kutimoj kaj gestoj honorigantaj tiun defendanton de la homo kontraŭ la ŝtelatendanta malsato. Jen unu el tiuj kutimoj. En domo nur la mastro rajtis distranĉi kaj disdoni la panpecojn kaj tion li faris post konsekrado per krucosigno farita sur la panbulo pere de tranĉilpinto.

Dum longa tempo la pano estis knedita en ĉiu kabano antaŭ ĉiu tendo, en ĉiu domo. La arkitekturo de la konstruaĵoj estis influita, ĉar oni devis trovi lokon por la bakujo. Ek de la Mezepoko oni kuiris dikegajn plurfuntajn panbulojn ; oni poste starigis ilin, sur la rando, inter la stangetoj de iu speco de ŝtupetaro, horizontale pendanta sub la traboj, neatingebla de la ratoj. Oni kuiris panon por du aŭ tri semajnoj kaj tio estis okazo de vera familia festo.

Dum la Roma Imperio la profesio de panisto naskiĝis kaj la cezaraj armeoj alportis la uzadon de tiu nutraĵo al Gallio. La Barbaroj detruis la panfarejojn sed en 630 la pankomercado estis restarigita en kelkaj urboj. Komence de la 13-a jarcento publika panfarejo estis organizita en Parizo, kiu ricevis specialan statuton sed la panistoj faris nur luksan panon. Antaŭ la franca Revolucio la pano estis devige kuirita en la Komuna Bakforno kontraŭ pago al la posedanto, t.e. la Sinjoro. Laŭ la vivrimedoj oni bakis nigran aŭ blankan panon, el tritiko, sekalo, hordeo aŭ miksaĵo de ili. En kelkaj regionoj oni aldonis muelitajn kuiritajn kaŝtanojn, eĉ glanojn. En la 19-a jarcento, kiam la Francoj prudente ekuzis terpomojn, oni ankaŭ utiligis tiun tuberon raspita kaj sekigita.

Pano-manko signifis malsategon kaj la historio de nia kaj aliaj landoj estas plena je rakontoj pri « malsato kiu mortigas la malriĉulojn ». Oni timis ĝin kiel peston kaj militon, timo ankoraŭ sentita de tro da homoj en la mondo kiuj suferas antaŭ ni, egoistaj satnutritoj. Komence de la franca Revolucio la spektro de malsatego obsedis la homajn spiritojn. Ili ne forgesis, ke en 1767, 1768 kaj 1775 multaj kamparanoj kaj urbanoj mortis pro nutromanko. Dum la 16-a kaj 17-a jarcentoj malsato iĝis endemia pro diversaj kaŭzoj : nesufiĉaj rikoltoj, manko de stokoj, spekulado. Okazis ke, dum grava krizo, kelkaj abatoj ĵetis sur la merkaton la troaĵon de la imposta dekonaĵo. Sed plej ofte ili restis ege prudentaj. Tio klarigas, ke pano estis atentinda faktoro de la eksplodo de la Franca Revolucio. Notinde estas, ke la 5-an de oktobro 1789, la pariza popolo iris al Versailles ne por elpeli la reĝon, la reĝinon kaj la reĝidon sed por revenigi la « Paniston », la « Panistinon » kaj « la Junan Panisthelpanton », kiel oni nomis ilin, eble esperante ke ili kunportos panon por ĉiuj. La reĝa familio ne plenumis la naivan deziron kaj la popolo ribelis. Popoloj ĉiam ribelas pro manko de nutraĵo aŭ manko de libereco.

E. BABIN.

ANGULO DE LA LEGANTOJ

Konforme al lasta decido de la Ĝenerala Asembleo de la kulturdomo Grésillon, paĝo estos rezervita al la leteroj de la legantoj ek de la venonta numero de Kulturaj Kajeroj.

Do, se vi deziras kompletigi artikolon per plua informo aŭ esprimi alian vidpunkton, vi nur skribu mallongan kontribuaĵon kaj sendu ĝin al mi (J.-P. Guillot, 21, rue des Aubépines, F — 86000 Poitiers).

Mi tre volonte aperigos ĝin, kondiĉe, tamen, ke ĝi ne estu polemika, atakema aŭ gramatika !

La redakcia sekretario,
J.-P. Guillot.

La enigma malapero de la mamutoj, antaŭ 10 000 jaroj.

Tra la tuta Siberio, pli norde en la arkipelago de Nova Siberio, kaj funde de la Arkta Oceano, oni retrovis, en la frostigita grundo, restaĵojn de mamutoj, pli malpli kompletaj. Ju pli norden oni iras, des pli multaj estas tiuj restaĵoj. Kelkajel tiuj frostigitaj korpoj estis tiel bone konservitaj, ke ili estis preskaŭ tiel bongustaj, kiel freŝa bifsteko. Kvankam, kelkfoje, oni retrovis tutajn korpojn kaj tutajn skeletojn, la plej multaj el tiuj restaĵoj estis ŝiritaj, kiel de kolosa forto. En kelkaj lokoj, la ostoj formis gigantajn amasojn, kiel montetojn ; al tiuj mamutaj ostaroj miksiĝis tiuj de ĉevaloj, antilopoj bizonoj, lupoj, felisoj, kaj aliaj bestoj pli malgrandaj. Oni ankaŭ retrovis plantojn : la franca esploristo ED. Toll malkovris, en la frostigita grundo de Nova Siberio, unu fruktarbon, altan je 27 metroj kaj ankoraŭ portantan verdajn foliojn. (la nura arbo, kiun oni hodiaŭ trovas en tiu regiono, estas saliko, alta je 2,5 cm).

La mistero montriĝis pli granda, kiam, en 1901, oni malkovris kadavron de tuta mamuto, apud la rivero Beresovka en Siberio. Montriĝis, ke tiu besto estis mortinta pro malvarmo — en plena somero — En ĝia stomako, oni retrovis, perfekte konservitajn, la plantojn, kiujn ĝi estis ĵus manĝinta. Oni povis ilin facile identigi : interalie estis ranunkoloj kaj sovaĝaj fazeoloj en plena florado : florado, kiu kutime okazas en julio-aŭgusto. La morto estis tiel bruska, ke la mamuto ankoraŭ havis en sia faŭko, buŝplenon da floroj kaj herboj. Sendube terura forto estis falinta sur la beston kaj estis ĝin transportinta tre malproksimen, for de ĝia paŝtejo : unu el ĝiaj kruroj kaj ĝia pelvo estis rompitaj ; la mamuto, vundita, genue estis mortinta, frostigita, en la sezono la plej varma de la jaro.

Pro ĝia dika felo, ĝiaj longaj haroj, oni longe opiniis, ke la mamuto estis arkta besto. kapabla elporti la malvarmegan klimaton de Siberio, kiel la boaco kaj la moska bovo. Tamen, en 1919, la franca biologo H. Neuville konstatis, ĉe mikroskopo, ke la mamuta haŭto ne estas pli dika ol tiu de la Hindia elefanto ; plie ĝi tute ne havas la grasajn glandojn, kiuj protektas la korpon kontraŭ humideco kaj malvarmo. Konklude, la mamuto ne apartenis al la malvarma faŭno.

De la plej antikvaj tempoj, la homoj konas tiun misteran tombejon de mamutoj. Dum centoj, eĉ miloj da jaroj, la mamutaj kornoj longaj je 3 metroj, liveris eburon al la azia komerco ; inter la jaroj 1880 kaj 1900 oni eltiris el Siberio proksimume 10 000 parojn da mamutaj kornoj.

Ja, la demandoj estas diversaj :

— Kiu enorma forto pereigis tiujn grandegajn brutarojn ?

— Kial tiuj brutaroj estis frostigitaj dum la varma sezono ?

— Kiakaŭze la Siberia klimato tiel bruske modifiiĝis ?

La klimato de Siberio hodiaŭ :

La vasta zono, kie -dank'al dolĉa klimato- vivis la mamutoj, hodiaŭ estas la tundro. La tundro etendiĝas laŭlonge de la Arkta Oceano, laŭ miloj da km, ĝis Alaska. La grundo estas frostigita laŭ dekoj da metroj kaj ne degelas sube de unu metro. La vintroj estas pli rigoraj ol en la norda poluso mem ; — 49° en januaro, + 15° en julio, tio donas meznombre — 16° ; tiu temperaturo ebligas nur, en somero, vastajn herbejojn, kaj marĉojn, kiuj tute ne povas nutri milionojn da mamutoj kaj aliaj bestoj.

Kiam la mamutoj ĉi tie vivis, la Siberia klimato estis pli dolĉa ; kiam la klimato iĝis arkta, antaŭ 10 000 jaroj, la bestoj pereis ; kaj de 10 000 jaroj, multnombro da kadavroj neniam degelis.

Kiu eksterordinara okazaĵo tiamaniere transformis la tiaman Siberian klimaton ?

Multaj scienculoj certigis ke tiu renverso okazis antaŭ ĉirkaŭ 10 000 jaroj.

Antaŭ 10 000 jaroj, dum Siberio kovriĝis je glacioj, Nordameriko, ĉe samaj latitudoj, varmi-

ĝis ; por Nordameriko, kiel por Eŭropo, tiam estis fino de glacia epoko : la klimato dolĉiĝis kaj la glaciejoj malaperis.

Studo pri Antarkto montris analogajn faktojn :

Oni longtempe pensis, ke, de milionoj da jaroj, Antarkto estis dronita sub glacia kupolo, dika je pli ol 1,5 km. Sed, de post la lasta mondmilito, malkovritaj pruvoj ebligas certigi, ke Antarkto konis dolĉan klimaton, en periodo relative freŝdata. La ekspedicio Byrd (1946-1947) kolektis funde de la maro, proksime de la Antarkta kontinento, specimenojn de sedimentoj. Radio-aktiveco montris, ke, unue, fajnaj sedimentoj estis alportitaj de riveregoj venintaj el kontinento libera je glacioj ; poste, de ĉirkaŭ 10 000 jaroj pli krudaj sedimentoj, apartenantaj al la aktuala glacia kupolo, kovris la antaŭajn.

Konklude, antaŭ 10 000 jaroj, dum Nordameriko varmiĝis, sam-latitude Siberio iĝis arkta kaj Antarkto kovriĝis je glacio. Sinjoro CH. H. Hapgoog profesoro pri antropologio en la Profesora Instituto de Keene (New Hampshire-USA) tiel eksplikis la fenomenon :

« Ne estas la klimato, kiu ŝanĝiĝis. Estas la Tera Krusto, kiu translokiĝis, transportante la kontinentojn de unu klimata zono en alian ».

« La geologoj nun scias, ke la maldika solida Tera Krusto troviĝas sur semi-likva tavolo ; ĉu tiu Krusto glitis sur tiu tavolo, transportante la tiaman Siberion internen de la Polusa Cirklo. Kaj ĉu, en la sama movo, ĝi portis Nordamerikon pli suden kaj la Antarktan Kontinenton pli proksimen de la Suda Poluso ? ».


La malvarmega klimato daŭris en tiuj regionoj.

« Sed, tiu nura movo, se ĝi okazis, ne sufiĉis, per si mem, por ekspliki la bruskan frostiĝon de la mamutoj. Ŝajnas, ke tiu movo de la Tera Krusto okazigis tre multajn vulkanajn erupciojn ; erupciojn, kiuj ellasis multajn nubojn de vulkanaj pulvoj, kiuj kaŝis la sunon. En 1912, la meteorologo W.J. Humphreys kalkulis, ke la pulvoj forĵetitaj de la vulkano Katmai, en Alaska, faris, ke 20 % de la sunaj radioj ne atingis la Teron ».

Hodiaŭ, oni ankaŭ pensas pri la kosmaj nuboj, kiuj translokiĝas en la Universo.

« Enormaj tempestoj de pluvoj kaj neĝofaloj, dum 40 tagoj, ŝajne superkovris kaj frostigis la bestojn, la multajn mamutojn. Kiam ili ĉesis, la kadavroj, kiuj troviĝis funde de la marĉoj, restis netuŝitaj, kun felo kaj karno ; la aliaj, transportitaj de enormaj glaciaj torentoj, estis disŝiritaj kaj oni retrovis nur la skeletojn ».

S. GUILLOT.



Tempo dediĉita al legado ne estas perdita tempo
Legu Majstran tradukon de majstra verko el la franca literaturo

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

tradukis : R. DUPUIS -- ilustris : R. PINCHON

tole bindita

PREZO : 36 FF + Sendkosto
Rabato 30 % por almenaŭ tri ekzempleroj

LA SEKRETO DE MASTRO CORNILLE (kornij)

de Alphonse DAUDET (Alfons DODE)

Francet Mamai (franse mamaj) grandaĝa fifrulo, venas de temp' al tempo, al mia muelejo, por pasigi vesperon kaj trinki kuiritan vinon ; antaŭ nelonge, li rakontis al mi etan vilaĝdramon, kies atestanto estis mia muelejo, antaŭ — ni diru dudek kvin jaroj. Tiu rakonto kortuŝis min kaj mi provos ripeti ĝin al vi tia, kian mi ĝin ricevis.

Imagu, karaj legantoj, ke vi sidas antaŭ glasego da parfumita vino kaj ke maljuna fifroludanto alparolas vin.

Nia regiono, kara sinjoro, ne ĉiam antaŭe estis senviva kaj senkanzona, kiel ĝi hodiaŭ estas. Antaŭe, tie okazis vigla komerco pri muelaĵoj kaj dek leŭgojn ĉirkaŭe, la kamparanoj alportis sian tritikon por muelado. Ĉirkaŭ la vilaĝo, la montetojn ornamis multaj ventmueliloj. Dekstre kaj maldekstre oni vidis nur flugilojn, kiujn la mistralo turnas super la pinoj ; svarmon da azenoj ŝarĝitaj je sakoj, irantaj supren kaj malsupren laŭlonge de la vojoj ; kaj la tutan semajnon, estis ja vera plezuro aŭdadi sur la monteto la bruadon de la vipoj, la kraketon de la tolo kaj la hotojn de la muelhelpantoj. Dimanĉe oni grupope iris al la muelejoj. Supre, la muelistoj ofertis muskatvinon. Iliaj edzinoj estis belaj kiel reĝinoj, kun siaj krucoj kaj kaptukoj. Mi alportis mian fifron kaj ĝis la nigra nokto oni farandolis. Tiaj mueliloj, sciu, donis riĉecon kaj ĝojon al mia hejmlando.

Plej bedaŭrinde, Francoj el Parizo ekpensis konstrui farunejojn mekanikajn ĉe la vojo al Taraskono. Kio novas, tio belas ! La viroj ekkutimis sendi sian tritikon al la farunistoj, kaj la ĉarmaj ventmueliloj restis senokupaj. Dum iom da tempo, ili provis rezisti kaj lukti, sed la vaporo venkis kaj unu muelilo post la alia, ve ! ĉesigis sian laboron. Oni ne plu ricevis la viziton de la etaj azenoj. La belaj muelistedzinoj vendis siajn orajn krucojn. Nenia muskatvino plu, nenia farandolo !... Malgraŭ la blovanta mistralo, la flugiloj restis senmovaj. Kaj unu tagon, la komunumo ordonis la malkonstruadon de la turoj kaj sur iliaj lokoj, oni plantis vitojn kaj olivarbojn.

Tamen, malgraŭ plena malvigliĝo, unu muelilo venkis kaj daŭre turnis siaj flugilojn kuraĝe sur la monteto, defiante la farunistojn. Estis la muelilo de Mastro Cornille, tiu ĉi mem en kiu ni pasigantas la vesperon.

Mastro Cornille estis grandaĝa muelisto, kiu zorgis de sesdek jaroj, pri farunaferoj kaj fervoris por sia metio. La instaliĝo de la farunistoj igis lin kvazaŭ freneza. Dum unu semajno, oni povis vidi lin trakuri la vilaĝon, amasiganta la homojn ĉirkaŭ si kaj plengorĝe diskrianta, ke oni volas venenigi Provencon per la produktoj de la farunejoj. « Nepre ne iru tien, li anoncis, tiuj rabistoj, por fari panon, uzas vaporon, diabla eltrovâjo, dum mi laboras per la mistralo kaj la Rusiljona vento, kiuj estas la spiraĵo de l'bona Dio ». Kaj li elpensis multajn belegajn argumentojn por laŭdi la ventmuelilojn, sed li neniun konvinkis.

Tiam, pro kolero, la maljunulo sin enŝlosis en sia muelejo kaj vivis tute sola kiel sovaĝa besto. Li eĉ rifuzis konservi kun si sian nepinon Vivja, dekkvinjara knabino, kiu, post la forpaso de siaj gepatroj, havis nur tiun avon. La kompatindino devis prigajni sian vivon kaj sin dungigi ie kaj tie en la farmobienoj por la gren rikolto, la silkraŭpoj aŭ la olivplukado. Kaj tamen, ŝia avo multe amis tiun knabinon. Ofte, okazis, ke li paŝis kvar leŭgojn sub varmega suno por viziti ŝin en la bieno, kie ŝi laboras kaj kiam li estis apud ŝi, li pasigis plurajn horojn rigardante ŝin kun larmoj.

En la regiono, oni opiniis, ke la maljuna muelisto forpelis Vivjan pro avareco ; kaj ne honoris lin lasi sian nepinon iri de farmo al farmo, elmetata al la brutalaĵoj de la mastroj kaj al la malbonaĵoj de la dungitaj gejunuloj. Oni juĝis tre severe, ke viro tiel renomita kiel Mastro Cornille kaj kiu ĝis tiam montriĝis tre respektinda disiras nun tra la vojoj, kiel vera cigano, nudpiede, kun truita ĉapo kaj disŝirita zontuko. Verdire, ĉiu mankis, kiam ni vidis lin iri al la meso, ni hontis pri li ni maljunuloj. ; kaj Cornille tiel bone konsciis pri tio, ke li ne plu kuraĝis eksidi en la presbitera benko. Li ĉiam restadis en la fundo de la preĝejo, apud la benitakvujo, kun la malriĉuloj.

En la vivo de Mastro Cornille, oni povis konstati ion neklaran. De longe, en la vilaĝo, neniu portis tritikon al li kaj tamen, la flugiloj de lia muelejo turniĝis kiel antaŭe... Vesepre, oni renkontis sur la vojo la maljunan muelistoN ; li kondukis azenon ŝarĝitan je dikaj farunsakoj.

— Bonan vesperon, Mastro Cornille, laŭte salutis la kampuloj ; ĉu la muelado daŭre iras glate ?

— Jes, jes tute glate, karaj, respondis la maljunulo per vigla voĉo. Dank'al Dio, la laboro ne mankas ĉe mi.

Tamen, kiam oni demandis lin, de kie devenas tiom da laboro, li metis fingron sur siajn lipojn kaj senride respondis « Motus » (silentu !) « Mi laboras por eksterlando ». Neniam ni povis ricevi plian informon.

Kaj rilate tion, enŝovi sian nazon en la muelejon, estis ekster ĉia espero. La juna Vivja mem neniam eniris !...

Kiam oni paŝis antaŭ ĝi, oni vidis la pordon ĉiam ŝlositan, la grandajn flugilojn senhalte moviĝantajn, la maljunan azenon manĝantan la herbon de la teraltaĵo kaj grandan katon negrasan, kiu priĝojis la sunon sur la fenestrosojlo kaj malafable rigardis vin.

Ĉio ĉi odoris mistere kaj instigis la homojn multe disklaĉi. Ĉiu siamaniere klarigis la sekreton de Mastro Cornille, sed la ĝenerala opinio estis, ke en tiu muelejo troviĝas multe pli da sakoj da eskudoj ol da faruno.

Tamen, finfine, ĉio fariĝis klara ; jen kiamaniere.

Dancigante la junularon per mia fifro, mi iam rimarkis, ke la plej aĝa el miaj filoj kaj la juna Vivja enamiĝis. Tute sincere, mi ne bedaŭris, ĉar, malgraŭ tio, ĉe ni oni honoris la nomon Cornille kaj tiel bela birdo kiel Vivja plezurigus min en mia hejmo. Sed ĉar niaj geamantoj trovis oftajn okazojn renkontiĝi, mi volis, pro eventuala okazaĵo, tuj finreguligi la aferon kaj mi iris

ĝis la muelejo por informi la avon. Ha ! maljuna sorĉisto ! Kiamaniere li akceptis min ! Neeble persvadi lin malfermi sian pordon. Mi laŭpove klarigis al li mi:ajn kialojn tra la serurtruo kaj dum mi paroladis, tiu fripona malgrasa kato ne ĉesis blovi kiel diablo super mia kapo.

La maljunulo ne konsent:s al mi la tempon fini kaj tre malĝentile kriis al mi, ke mi reiru al mia fifro ; li aldonis, ke se urĝas al mi edzigi mian knabon, mi povas preni knabinon en la farunejoj... Kredu, ke mia sango turniĝis en mia kapo, dum mi aŭdis tiujn malafablajn parolojn ; sed mi sukcesis fine trovi sufiĉe da prudento por rezisti, kaj forlasante la frenezulon al lia muelŝtono, mi re:ris al la geknaboj anonci mian disreviĝon. Tiuj amindaj geŝafidoj ne povis kredi tion kaj petis de mi kvazaŭ gracon, ke ili ambaŭ supreniru al la muelejo por paroli kun la avo. Mi ne aŭdacis rifuzi kaj pst ! jen m:aj geamantoj for !

Ĝuste kiam ili alvenis supren, Mastro Cornille jus eliris. La pordo estis duoble ŝlosita, sed la maljunulo, forirante forges:s la manŝtuparon ekstere kaj tuj la geknaboj eniris tra la fenestro por vidi tion, kio okazas en tiu neordinara muelejo.

Stranga spektaĵo ! La ĉambro de la muelŝtono estis malplena... Eĉ ne unu sako nek triktikgreno. Ne la plej eta farunero ĉe la muroj, nek sur la araneaĵoj... Oni eĉ ne flaris tiun agrablan odoron de tr:tiko premegita, kiu aromis en la muelejoj... La ŝafto estis polvokovrita kaj la granda malgrasa kato dormadis sur ĝi.

La suba ĉambro montris la saman aspekton de mizero kaj forlasiteco — malkomforta lito, kelkaj ĉifonoj, panpeco sur ŝtupo kaj en angulo tri aŭ kvar sakoj ŝiritaj el k:uj falis rubo kaj senkolora tero.

Tie kuŝis la sekreto de Mastro Cornille ! Tiun gipson li promenigis vespere tra la vojoj por konservi la honoron de sia muelejo kaj opiniigi ke tie, oni fabrikas farunon... Kompatinda muelejo ! Kompatinda Cornille ! De longe, la farunistoj forrabis lian lastan klienton. La flugiloj daŭr:gis sian turniĝon, sed la muelŝtono nenion plu premis.

La geknaboj revenis kun larmoj, rakonti al mi, kion ili vidis. Aŭskulti ilin forŝiris m:an koron... Ne perdante eĉ unu minuton, mi rap:dis al la najbaroj kaj kelkvorte klarigis la aferon kaj ni decidis, ke necesas tuj porti al la muelejo Cornille la tutan tritikon troveblan en niaj domoj. Tuj dirite, tuj farite ! La tuta vilaĝanaro ekmoviĝas kaj ni alvenas supren kun procesio da azenoj ŝarĝitaj je tritiko, vera tritiko, ĉi foje.

La muelejo estis larĝe malfermita ; antaŭ ties pordo, Mastro Cornille sidante sur sako da gipso ploradis kun sia kapo en la manoj. Revenante, li ĵus rimarkis, ke dum sia foresto, oni eniris en lian muelejon kaj trovis lian malĝojan sekreton...

— Kiel malfeliĉa mi estas ! li diris. Nun, unu solvo restas al mi, morti. La muelejo estas senhonora.

Kaj li plorsingultis plej kompatinde, nomante sian muelejon per ĉiuj nomoj kaj alparolante ĝin, kvazaŭ ĝi estus vivanta.

Je tiu momento, la azenoj atingas la supraĵon kaj ni ĉiuj krias laŭtege, kiel dum la ora epoko de la ventmuelejoj : — Hoj ! muelejo ! Hoj ! Mastro Corn.lle !

Kaj nun la sakoj amasiĝas antaŭ la pordo kaj la bela flava greno disetendiĝas surtere kaj ĉiuflanke...

Mastro Cornille larĝe malfermis siajn okulojn. Li prenis tritikon en la kavaĵo de sia maljuna mano kaj diris samtempe r:dante kaj plorante :

— Tritikon ! Ho ! Dio ! ...Bonan tritikon !... Permesu, ke mi ĝin rigardu.

Kaj turnante sin al ni :

Ho ! Mi ja sci:s, ke vi revenos al mi. Ĉi ĉiuj farunistoj estas ŝtelistoj.

Ni volis triumfe porti lin al la vilaĝo.

— Ne, karaj, ne ! antaŭ ĉio, mi devas nutri mian muelejon. Imagu ! De t:el longe, li nenion englutis !

Ni ĉiuj havis larmojn en la okuloj, vidante la kompatindan maljunulon klopodi kaj dekstre kaj maldekstre ; malfermi la sakojn, kontroli la muelŝtonon, dum la greno dispremiĝis kaj la tritika pulvoro suprenflugis al la plafono.

Estas juste skr:bi tion ĉe nia kredito, ek de tiu tago, ni neniam lasis la kompatindan mueliston sen laboro. Kaj, iun matenon, Mastro Cornille forpasis, kaj la flugiloj de nia lasta muelejo ĉesigis sian turniĝon kaj, ĉi foje, por eterne... Post lia morto, neniu anstataŭis l.n. Tiel estas, sinjoro ! Ĉio venas al sia fino en tiu mondo kaj oni devas opinii, ke la epoko de la ventmueliloj forpasis ; same kiel la erao de la r:verkaleŝoj sur Rodano, de la lokaj parlamentoj kaj grandfloraj jakoj !

trad. R. RIBOT.



SOLECAJ PROVINCANGULOJ de ESPERANTUJO

Troviĝas solecaj anguloj en Esperantujo kie estas malfacile aranĝi kursojn por disvastigo de la Internacia Lingvo kaj eĉ pli, funkciigi ilin. Tamen, tio ne signifas, ke tie malĉeestas fervoraj konantoj de la bela zamenhofa lingvo. Iufoje, ili estas ege lertaj kaj eĉ kompensas la animojn de ĉiuj bonintencaj personoj pro la neevitebla malsufiĉo de la plenumado.

Unu el tiuj anguloj (alimaniere glora) estas la Kunea Provinco (Provincia di Cuneo), nordokcidente de Italio. Pluraj esperantistoj, sur la teritorio disigitaj, de tempo al tempo okaze renkontiĝas kaj parolas pri siaj problemoj, ĉiam certaj ke la estonto, sendube, alportos al ili mirindajn kontentigojn.

Tiu provinco etendiĝas de la piedoj de la Maraj kaj Kocjaj Alpoj, preterpasas ebenaĵon fekundan je rikolto, kaj atingas « Le Langhe », longan strion de verdaj montetoj produktantaj per siaj vinberejoj bonajn kaj famajn vinojn.

En la ebenaĵo kuŝas la trankvila urbeto, preskaŭ vilaĝo, kiu nomiĝas Savigliano (pr. Saviljano). Tie, je la komenco de la pasinta jarcento, Henri Beyle, la fama franca verkisto, pli bone konata sub la kaŝnomo Stendhal, pasigis malmultajn monatojn kiel garnizona oficiro de la napoleona armeo kaj, verdire, li iomete tediĝis pro la troa kvieteco de la medio. La hodiaŭaj saviljananoj, eble kun la sincera intenco esprimi penton pro la kulpa trankvileco de la gepatroj, dediĉis al li, ho ve !. ege kvietan kaj enuigan vojeton !

Tie, antaŭ pli ol sepdek jaroj naskiĝis kaj, sen iu ŝanĝo de loko, vivadis kaj vivas Michele Mariano, esperantisto kampardevena, kiu grandan parton de sia vivo pasigis unue, kiel simpla kamparservisto, poste kiel lignaĵisto kaj metilaboristo, fine kiel estro de ilmagazenoj en sufiĉe grava fabrikejo.

Dum sia longa, malmilda laborvivo, li trovis la tempon studi per si mem, iom post iom, klopodante dume atingi fundamentan celon : krei en sia menso klerecon kaj transdoni ĝin al kiel eble plej multaj aliaj personoj, ĉefe per Esperanto.

Li progresis tutsole : post sia knabetaĝo, li ne plu eniris lernejan ĉambron kiel regula lernanto. Tamen, sukcese li trapasis siajn ekzamenonjn kaj doktoriĝis per disertacio pri lingvistiko, instruobjekto de li preferata. La temo koncernadis specialan teknikan lingvon de la laboristoj kiuj jam estis liaj kolegoj en urbeto Saviljano. Tiu fakto, pro la ne plu juna aĝo de la diplomito, pro lia kampara kaj laborista deveno, pro la temo lerte pritraktita, eĥe resonis ekster la universitataj medioj : parolis pri li kaj ĝia doktoriĝo tagĵurnaloj magazinoj, radio, televido kaj aliaj komunikiloj de la tuta Italio.

Post la doktoriĝo, Michele Mariano ekigis la realigon de lingvistika originala projekto kiu jam de longa tempo turniĝis en lia menso : nova vortaro surbaze de originalaj sistemaj principoj.

Malmutvorte, kaj eble ne sufiĉe precize (mi ne estas lingvisto) mi klarigos la esencan teorion kiu montriĝas tute mala al ordo sekvita en la kutimaj tradiciaj vortaroj : ĉar, dum en la alfabetaj vortaroj oni iras de la termino al klarigo de ĝia signifo, per la mariana teorio oni supreniras de la ideo (aŭ koncepto) al ĝia speciala termino, kiu, dank'al genia ordiga kapableco de la aŭtoro, estas grupigita kun la aliaj de la sama familio, tiel ke la aroj da analogiaj ideoj aspektas kiel utilaj, detaligitaj kaj sugestaj kadroj.

La verko estis redaktita de Michele Mariano, kun la kuraĝigo de ia itala akademianino Clecia Conterno kaj de alilandaj fakuloj, de Kanado ĝis Orienta Germanio, de Islando ĝis Brazilo, ktp... La volumo publikiĝis dank'al Eldonejo de Lina Gabrielli (1980) kun la titolo « Esperanto-vortaro per temotabeloj », kiel unua specimeno de la novaĵo. Inter aliaj esperantistoj, la granda Gaston Waringhien favore recenzis ĝin en la revuo « Esperanto » (Oktobro 1981) kaj juĝis ĝin « helpo-n de granda valoro », « verkego-n kiun oni povas adapti al iu ajn lingvo », kaj li dankis « s-ron Mariano, ke li unuapaŝe dediĉis sian talenton kaj persistecon al la realigo de ĝia esperanta versio ».

Nune, D-ro Mariano tage kaj nokte konstante laboras por efektivigi la plenan esperantan redakton de tiu vortaro en kiu ankaŭ pli bone li evidentigos la originalecon de sia teorio. Ni esperu ke ni povos vidi ĝin plenumitan en ne tro malproksima estonteco.

Do, lertegajn lingvistojn povas produkti kamparprovinco.

Kion oni diros pri poetoj ?

Jen unu : Giovanni Roattino, ĉiam inspirita en siaj originalaj poeziaĵoj, ĉiam tre kapabla je tradukadoj.

Li vivas patriarke, meze de izolita kamparo ; ĉirkaŭita de edzino, filinoj, bofiloj kaj nepoj en bela domo kie hundoj ĝoje bojas kaj kie iuj strangaj merloj libere flugetas reproduktante per voĉoj imprese nuancitaj la vortojn kaj la frazojn de la homoj.

Giovanni Roattino, emerita instruisto, multe suferis dum sia vivo. Tamen, la vizitantoj de li ricevas senton de serena kvieteco kiu al ili forgesigas la angorojn de la hodiaŭa mondo.

La domo estas sur bela monteto de Vicoforte Mondovi, tute apud fama sanktejo kiu de longe vidigas mirindan kupolon (oni diris al mi, ke ĝi estas la kvara preĝeja kupolo en la mondo, post tiu de la roma Sankta Petro. mi raportas...). En tiun bazilikon (jen alia napoleona memoraĵo) iun tagon generalo Ney aŭdacis rajdeniri : provoka malbona ago de malestimo, farita meze de terurigitaj vilaĝanoj !

Giovanni Roattino verkas belajn poemetojn siajn kaj plej ofte tradukas en esperanton per eksterordinara arto tiujn de klasikaj italaj poetoj. Poste li ilin sendas al naciaj kaj internaciaj revuoj kiuj, kiel « El popola Ĉinio » volonte ilin eldonas por la ĝojo de la legantoj.

Jen originala poezi:aĵo jam de li sendita al esperanta konkurso en Trieste kie ĝi ricevis premion :

Fratamo

Kirle tondras la tertremo.
Ho veinda homa sorto !
Sed pli viglas, jen l'amemo :
Ĝi pluvivas trans la morto.

Venu helpo el ajn lando :
Vivo indas ĉiel daŭri.
Ĉiuj streboj en kunfando !
Ne sufiĉas nur bedaŭri.

Sur la lipoj de l'restintoj
Ree floru eta rido ;
Rememor' de l'pereintoj
Estu fajro por la fido.

Zorg' doloro kaj ĉagreno :
Jen pokal' de l'homa vivo.
Nun ne premu morna spleno :
Ĉiuj kune ! « Ne » al drivo.

Ho ! benita la frateco
Intermonda la popolo !
Estas nur solidareco
De la gentoj la konsolo

Je l'subir' de vivpilgrimo,
Ĉe l'enir' de lasthaveno,
Al ni sonu : For la timo !
Estas tag' de daŭra beno !

La sentoj de la poeto estas ankaŭ la sentoj de la homo.

Sed, sammaniere bela kaj eksterordinara, pro la ekzakta esprimrespondeco al originala kosma pesimismo, estas la traduko de fama poemeto de Eugenio Montale, itala, premiita per Nobela prem.o, de nelonge forpasinta.

Tratagmezi

Tratagmezi pale kaj reve
Apud brulanta muro de ĝardeno,
Aŭskulti inter dornoj kaj veproj
Ŝmacojn de merloj, susurojn de serpentoj.

En la fendoj de l'grundo kaj sur vicio

Spioni vicojn da formikoj ruĝaj,
Kiuj nun disiĝas, nun plektiĝas
Sur la supro de terbuloj etaj.
Rigardi inter branĉoj, speguligon
Foran de la maraj skvamoj,
Dum tremetaj zumoj sin levas
De cikadoj el senharaj pintoj.

Kaj en blindiga sun'irante

Senti kun malgaja miro
K el estas viv' kaj turmento ĝia,
En tiu ĉi sekvadi dikan muson,
Verte-havan pintojn splitoj de boteloj.

Ankaŭ tiu-ĉi tempe, eĉ en provincaj anguloj preskaŭ forgesitaj de la mondo, povas brili kaj disverŝi belajn radiojn la lumturoj de esperanta kulturo.

Arnaldo Boccalatte.

GRÉSILLON 1982

Iam venis al Grésillon
Ok personoj el Anglujo.
Laŭ konsilo de amiko
Ken Mc Lennan — tre konata
Al amikoj de Grésillon.

« Iru » diris Ken Mc Lennan,
« Certe vi feliĉaj estos.
En Grésillon vi ja trovos
Esperantan familion
En etoso tre amika ».

Do, ni venis kaj ni trovis
Ĉion kion Kenneth diris —
Amikecon tre profundan
Trankvilecon kaj ripozon
En la belaj ĉirkaŭaĵoj.

Sed ne estis nur ludado.
Je du fojoj ĉiutage
Streĉe ni laboris mense
Studis gramatikajn punktojn —
Dormigiloj ne necesis.

Ĉiutage ni aŭskultis
Prelegantojn vere spertajn.
Poste estis diskutado
Pri la temo de mateno
Kaj ni mense ekzercadis.

La vetero estis varma —
Eĉ varmega kelkajn tagojn.

Kelkaj naĝis, kelkaj dormis
Trinkis teon aŭ bieron
En la belaj sunaj tagoj.

Je dimanĉo ni bankedis
Sidis tutan post-tagmezon
Ĉe la tabloj dum ni manĝis
Riĉajn manĝojn por celebri
La tri-dekan dat-revenon.

Dum vesperoj ni kunvenis
En ĉambrego malvarmeta
Kie ni distraĵojn ĝuis.
Abundegis brilaj fotoj
Pri diversaj foraj landoj.

Je Sabato TESPA venis
Donis longan teatraĵon
Brile ludis, brile faris
Jean-Paul Sartran tradukadon —
« La Infero », ĝia nomo.


Unu nokton, ni la Angloj
Prezentadis kelkajn skeĉojn,
Ŝercis, kantis eĉ aktoris,
Por amuzi aŭdantaron
De la karaj ĉeestantoj.

Espereble unu tagon
Ni revenos al Grésillon,
Sed por ĉiam en la koro
Ni entenas la memoron
De mirinda libertempo.

Beryl GEORGE.

POR VIA DISTRO

Krucvortoj (proponitaj de René Raynaud)



R : nur radiko.

Horizontale :

1 — Sanitara trajno (R).

2 — Ĝi estas tre agrabla en Grésillon (R) — Famaj estas tiuj de Pompejo.

3 — Kavaĵeto en ŝoseo estigita de rapida veturilo — Prepozicio.

4 — La komenco de saĝeco — Tio, kiu elnaskiĝas — El pli perfekta estaĵo — Interpunkcia signo (R).

5 — Rilata al eŭropa duoninsulo (R) — Sorĉa muziko (R).

6 — Sud-Amerika ĉefurbo (R) — Por alvoki telefon-korespondanton — Gvati (R).

7 — Ŝmiras — Kanalo.

8 — Aŭtoro de treege implikita nodo — La unua pozicio en skermado.

9 — Malofta gaso — Tri estas tiu de dudekkvar (R).

10 — Graminaco (R) — En adreso.

11 — Igi senpene farebla (R) — Vermo ne havas (R).

12 — inverse : Teksaĵo — Dormetoj.

Vertikale :

1 — Aŭtoro de vortaro.

2 — Ĉe la antikvuloj, melankolia humoro — Se neĝas sur la monto, estas malvarme en ĝi (R).

3 — Grekdevena nomo de virino — Sen komenco nek fino.

4 — Staŭdo kaj unujara herbo ĝardene multe kulturata pro ties belaj floroj (R) — Genra nomo de la glandaj inflamoj (R).

5 — Miksaĵo de gelato kun lumimpresiĝema substanco.

6 — Fiŝo — Leviĝis kaj malleviĝis.

7 — Tiradi post si (R) — Manĝa, trinka kaj seksa diboĉo (R).

8 — Ĝi estas pli granda ol ĉiu el ĝiaj partoj — En siropo.


9 — En la nomo de brazila havenurbo — Muzika teatraĵo — Verba finaĵo.

10 — Sufikso — Senpartie, li juĝas literaturan aŭ belartan verkon (R).

11 — Kontraŭsepsa substanco — Nomo de litero.

12 — Belorusuja rivero (R) — Pronomo.

GRAMATIKO PER BONHUMORO



Ja, forgeso de la administracio !

Sinjoro, ni afable petas vin, ke vi indiku al ni, kie oni povas trovi ireblan promenadon ĉi tie.



Paŝo post paŝo

Ankoraŭ vi ! Jam dek fojojn mi diris al vi : ĝis revido, ĝis revido ! ĉu ni vetas je kiu alvenos la unua ?



La bela vivo !

Vivu la libertempo ! Kia feliĉo ! Dum la tuta somero, plenplene ĝis tagmeze, ni profitos de ĉiuj dimanĉaj matenoj.

La Modoj

INDIKATIVO : ĝi prezentas agon aŭ staton realan :
— **prezenco, preterito, futuro** (as, is, os)
— mi venis, mi kantas kaj mi foriros.

KONDICIONALO : montras, ke la ago dependas de la kondiĉo aŭ estas nur probabla : US
— se mi estus sana, mi estus feliĉa.

VOLITIVO : U montras celon, deziron, volon, ordonon aŭ peton :
— la esperanta volitivo respondas jen al la imperativo, jen al la subjunktivo de la eŭropaj lingvoj, laŭ tio, ĉu ĝi estas en ĉefa aŭ dependa propozicio :
— respondu la demandojn.

RIMARKO : la **optativo,** konata en la greka lingvo, montras deziron :
Vivu la reĝo ! tiel estu !

INFINITIVO : I montras la agon en plej ĝenerala maniero ! — ne ekpepi — planti en tia aĝo ! — li sentis sin fali.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichs trasse, 2, LINZ (170 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (330 fr.).
Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (5,00 pundoj).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregards vej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (65 kr.).
Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivis töntie, 05510 Hyvinkää 51 (44 mk).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).
Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10° - D ALICANTE - (850 pes.).
Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (12 us. dol.).
Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Gorizia 17, 28100 NOVARA — p.k. 14321285 (10 600 liroj).
Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (12 U.S. dol.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (22 guld.).
Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.
Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (12 us. dol.).
Svedujo : Eldona Societo Esperanto, poŝtkonto 596768-2 216.11 Malmö (45 kr.).
Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (22 fr.).
Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (12 us. dol.).
Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 12 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 4 - 5 de 1982, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Un bilan provisoire de la saison 1982 sera fait comme d'habitude à la réunion statutaire du Conseil d'Administration en octobre. Les premières statistiques montrent que la participation a été moindre cette année, en particulier pendant la première période. Le conseil d'Administration en étudiera les causes et en tirera les éventuelles conséquences. Malgré cette baisse de participation les différentes périodes se sont déroulées avec succès, succès plus ou moins marqué selon « l'entrain » des uns ou des autres. Pour la première fois L.-F. Koop a organisé à Grésillon une fin de semaine d'étude. Malgré le nombre moyen de participants, trente, le succès a été tel qu'un deuxième Esperanto-Rendevuo sera organisé en 1983, mais à une autre date.

Pendant l'été l'opinion d'un certain nombre de stagiaires a été demandée concernant le déroulement des stages, le fonctionnement de la Maison et les activités. Il semble que les anciens acceptent les imperfections compensées pour eux par des avantages certains. Des remarques ou suggestions faites, certaines sont concordantes et seront discutées. D'autres, moins réalistes, ne tiennent pas compte du fait que la Maison Culturelle encaisse de l'argent pendant 9 ou 10 semaines et en dépense pendant 52 ; qu'elle doit faire face aux dépenses de personnel indispensables et à l'entretien des bâtiments sur ses propres deniers, ce qui n'est pas le cas de la plupart des centres non-esperantistes qui accueillent les stages proposés par tel ou tel organisme.

Depuis trois ans, il est périodiquement question de réaliser le branchement de la distribution d'eau du château sur le circuit intercommunal. L'été nous a montré que nous n'avions pas eu tort l'an dernier de prévoir ces travaux pour l'hiver 1982. Mais l'éloignement du château par rapport à la route, c'est-à-dire par rapport à la canalisation principale, fait que le coût de cet investissement atteindra 40 000 francs. Le budget de la MCE ne permettra pas une telle dépense car d'autres travaux sont également à envisager. Il faudra donc avoir recours à l'emprunt. Le plus avantageux serait que des amis acceptent de prêter, sans intérêts, une somme remboursable en deux ou trois ans. Une amie s'est concrètement manifestée. Il faudrait que d'autres suivent pour couvrir, au moins en partie, la dépense.

L'appel concernant les plantations d'arbres a été entendu, parfois diversement. Le paiement des peupliers, sycomores, merisiers et pins déjà plantés a été réalisé grâce à la vente d'arbres. Le rajeunissement du bois pourra se poursuivre selon le même principe. Donc, l'idée lancée par une amie ne peut concerner que des arbres ou des arbustes d'ornement et quelques fruitiers à planter dans le jardin en remplacement d'autres, qui trop vieux, ne produisent plus. Mais il ne nous est pas possible de donner un catalogue des « arbres à planter » avec le prix, sur lequel les donateurs choisiraient leur arbre. La plupart des amis qui ont donné une somme nous ont demandé de décider de son utilisation. Quelques autres ont donné une destination à leur don. Ces vœux seront evidemment prioritaires. Mais il est deux considérations que nous ne devons pas négliger : n'importe quel arbre ne pousse pas en n'importe quel terrain ni sous n'importe quelle latitude ; d'autre part il est souhaitable que les arbres choisis soient décoratifs pendant les séjours. Nous nous efforcerons de faire au mieux et en remerciant celles et ceux que cet appel a intéressés nous leur promettons de les tenir au courant de l'utilisation des dons faits dans ce but.

Il va nous falloir maintenant mettre sur pied les activités de l'année 1983. Nous pensons que le calendrier général sera à votre disposition dès le 15 novembre.

P. BABIN.

INTER NI

Dum la someraj monatoj de 1982 la nombro da ĉeestantoj ne estis tiel granda, kiel en la antaŭaj jaroj, ĉefe dum la unua periodo. La konsilianoj studos tiun problemon. Tamen la aktivaĵoj renkontis sukceson pli malpli granda laŭ la « vigleco » de la ĉeestantoj. La Esperanto-Rendevuo de la fino de aŭgusto, organizita de L.-F. Koop, multe plaĉis. Pro tio Dua Esperanto-Rendevuo okazos venontjare, sed tre verŝajne je alia dato.

Sugestoj kaj ideoj estis donitaj al ni dum la somero ĉefe de ĉeestantoj, kiuj ĝis nun ne vizitis la kastelon. Kelkaj ne konscias, ke la Esperanto-Domo enspezas monon nur dum 9 aŭ 10 semajnoj sed elspezas dum 52 semajnoj. Ĝi ricevas neniun subvencion sed devas pagi riparojn de la konstruaĵoj kaj prizorgadon de la tuta bieno. Tamen pluraj el la sugestoj estas tre interesaj kaj meritas pridiskuton.

Malagrabla okazaĵo dum la somero montris, ke urĝas la instalado de sistemo por helpi la puton, kiu ne ĉiam komplete respondas la demandon. Ni jam de du jaroj antaŭvidis la konstruadon de branĉtubo por alporti akvon de la interkomuna akvo-tubaro al la kastelo. La ordinara buĝeto ne povas sola fronti la elspezon ĉar la tubo devos esti pli ol 300 metrojn longa. Ni esperas, ke kelkaj amikoj konsentos, kiel jam faris unu, pruntedoni sumon, senprofitan, repagotan en du aŭ tri jaroj.

La alvoko pri plantado de arboj ricevis kontentigan eĥon. Sed ni devas aldoni kelkajn precizigojn. Principe, la plantado de junaj arboj cele al rejunigo de la arbaro estos pagita dank'al la vendado de brulligno. La sumoj ricevitaj estos utiligitaj por la aĉetado de arboj kaj arbetoj ornamaj kaj de kelkaj fruktarboj plantotaj en la ĝardeno. Ni ne povas doni katalogon de la « aĉetotaj arboj », por ke la donacantoj elektu sian arbon. Ankaŭ ne eblas promesi, ke ni povos plenumi la dezirojn de kelkaj amikoj koncerne tiun aŭ tiun ĉi elektitan arbeton. Ne iu ajn arbo kreskas en iu ajn grundo, en iu ajn klimato. Ni ankaŭ devas zorgi, ke la aĉetitaj arboj estos ornamaj, se eble florkovritaj, dum la someraj monatoj.

Nun ni starigas la kalendaron kaj la programon de la jaro 1983. Ili verŝajne estos je via dispono post la 15-a de novembro. Jam pripensu pri via somera libertempo.

NOS PEINES

Le 23 août Monsieur G. Ciret nous a quittés. Il était connu de beaucoup d'espérantistes grâce à notre Libro-Servo dont il a été le responsable pendant de nombreuses années. Mais Georges Ciret était plus que cela. Membre de la MCE à sa création, il a très vite consacré une bonne part de son temps libre à apporter une aide appréciable bien que discrète à Grésillon. Avec Madame Ciret, il a accepté la responsabilité de stages en un temps où être responsable, c'était aussi faire une part obscure du travail matériel.

A Madame Ciret, à ses enfants, nous présentons avec notre profonde sympathie, toute notre amitié.

***

« Mi triste sciigas al vi, ke Jozefo post longa sufero la 9-an de majo en la hospitalo mortis ».

Jen la unuaj vortoj de la letero de Helena Mikulas anoncinta la forpason de sia edzo, Jozefo. Ĉiuj, kiuj partroprenis la staĝon ICEM-GEE en Grésillon, en 1975, certe memoras tiun simpatian kaj aktivan paron. Al Helena kaj al ŝiaj filinoj ni adresas niajn korajn kondolencojn.

EXAMENS A GRÉSILLON EN 1982

Ont réussi aux examens :

EXAMENS DE L'INSTITUT FRANÇAIS D'ESPERANTO :

— Atesto pri Elementa Lernado :

Bernard Simone, Bernardin Marie-Antoinette, Binche Dominique, Bourguet Suzanne, Cardona Pierre, Cruchon Jean, Guefuen Raymond, Jean-Louis Jacqueline, Kruissel Patric, Leduc Sylvie, Nizet René, Sabatier Thérèse, Sire Serge, Trochet Pierre, Vince Ferdi, Von Götzen Konstantin.

— Atesto pri Praktika Lernado :

Bernard Simone, Bernardin Marie-Antoinette, Epchtein Simone, Gallet Michèle, Kruissel Patric, Laporte Joël, Wallez Gilles.

— Atesto pri Kapableco :

Amable René, Berger Marie-Josèphe, Martinot Yvonne, Servais Catherine.

EKZAMENOJ DE LA KULTURO-DOMO :

— Internacia Atesto pri Elementa Lingvoscio :

1a kaj 2a periodoj : Gregson Gordon, Griffiths Eileen, Kahlert Walter, Murphy Ralph, Stiling Barbara, Troper Klara, van Wylick Yvonne, van Wylick Huguette, Voghera Margit, von Götzen Konstantin.

3a periodo (kurso L. Mee) : Cardona Pierre, Castillon Christian, Cerqueda Conchita, Derzelle Jean-Marc, Héraud Denis, Jean-Louis Jacqueline, Kruissel Patric, Leduc Sylvie, Nobecourt Prunelle, Pla Michel.

— Internacia Atesto pri Praktika Lingvoscio :

George Beryl, George Victor, Troper Klara, von Götzen Konstantin.

Nos félicitations à tous.

LIBRO-SERVO

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

Adressez vos commandes à :

Janine VINCENT
B.P. 54
49150 BAUGE

Intitulé pour les chèques :
Maison Culturelle Esperantiste
C.C.P. : 1 485 39 P NANTES

Port gratuit pour commande au-dessus de 100 F.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 80,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 50,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

Les extraits de notre catalogue

★

Aujourd'hui...

"LIBERTÉ OU AUTORITÉ DANS L'ÉVOLUTION DE L'ESPERANTO"

(en français)

Thèse de 3e cycle de François Lo Jacomo

Prix : 90 F.

Conseil d'Administration du 27 Juin 1982

La séance est ouverte à 10 heures.

Les membres présents sont : Mme Mathé, Messieurs Babin P., Boyet, Métivier, Dairon.

Se sont excusés : Mmes Cheverry, Micard, Vincent, MM. Babin D., Bénistant, Bodereau, Chevalier, Guillot J.-P., Lemagadure, Lloancy.

Le président Babin fait part des remerciements de M. Lloancy pour la confiance que lui a accordé le C.A.

M. Grela a également accepté sa nomination comme conseiller technique.

STAGES 1982 :

— Le premier stage s'annonce vraisemblablement moins bon que l'an dernier : 50 inscrits seulement.

— Pour les autres, le nombre augmente au fur et à mesure des inscriptions de dernière minute : 2e stage, 63 ; 3e stage, 63 ; 4e stage, 35.

Les causes sont diverses : Proximité du congrès international. Le nouveau calendrier a surpris certains participants, ceux qui, en particulier, voulaient assister au congrès, car le premier stage de deux semaines ne va pas jusqu'à la date du congrès d'Anvers. La publicité a été plus tardive que d'habitude.

Le fonctionnement est, lui aussi, modifié : Mme Corvaisier est malade pour une durée indéterminée et ne pourra pas assurer de service cet été.

Mme Rifier fera la cusine en juillet, Mme Anjard en août.

Le jardinier est en congé depuis le mois de juin et son remplaçant temporaire donne toutes satisfactions.

TRAVAUX :

L'eau chaude est installée et fonctionne bien dans les chambres extérieures.

L'escalier du 2e étage a été insonorisé grâce à la pose de moquette, ainsi que le palier de l'interétage.

La pose de la tapisserie du 2e étage a été terminée. Une moquette a été posée dans la chambre 17. M. et Mme Seguin, Paul Bénaïm, Mmes Lenel, Rigal, Vincent ont remis à neuf la chambre des employées de cuisine. Yannick Lemagadure a également participé aux travaux.

Les plâtres de la chambre 35 ont été refaits. La salle de vannerie a été restaurée.

L'adduction d'eau par le bélier ne fonctionne plus car le réservoir a une fuite impossible à colmater.

Le puits ne sera pas suffisant pour arroser le jardin. Il faudra envisager sérieusement l'alimentation en eau de la propriété par le service intercommunal.

Le fléchage par panneaux en direction du château a été réalisé par la municipalité.

FONDUSO BEL BONA ESPERO :

Une esperantiste anonyme désire apporter une aide financière à Grésillon en permettant d'offrir des séjours à de jeunes stagiaires. Le capital sera géré sous forme de bons de caisse anonymes. Une partie des intérêts permettra de renforcer le capital. L'autre sera utilisée pour des séjours. Le C.A. remercie la généreuse donatrice.

La séance est levée à 13 heures.

Le secrétaire de séance,
Guy Dairon.

Pour vos vœux de fin d'année
La Maison Culturelle a pensé à vous.

Commandez à notre Libro-Servo :

la très belle carte de vœux
représentant le Château

★

PRIX : 3 francs l'unité
+ frais d'envoi
12 francs les 5

Pour vos lectures
Pour vos cadeaux de fin d'année

un chef-d'œuvre de la littérature française
magistralement traduit par R. DUPUIS

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

illustré par R. PINCHON
relié pleine toile

★

PRIX : 36 francs
— Rabais 30 % à partir de 3 exemplaires —